

# afrikume


afrika cirkulero de kultura centro esperantista

julio 2006 - numero 3

suplemento al *Heroldo de Esperanto* n-ro 2091

redaktoro: Adjévi Adjé


## vere ekzistu strukturo por afrikaj E-laboroj

Afrika Centro Esperantista fondiĝis antaŭ la rompo de la kontrakto UEA/IZo fare de la estraro kaj ĝenerala direktoro de UEA. La ideoj pri ĝi aperis jam en la dua semestro de 2005, kiam la menciitaj ĉiel ajn minacis pro la kunlaboro de TIETo kun la Esperanta Civito kaj precipe pro nia rilato kun Giorgio Silfer.

Kial tiom da persekutoj? Ĉu nur pro la subvencio 5.000 eŭroj jare, kiuj venas al IZo el UEA-spezokontoj por kontribui al afrikaj E-laboroj (AO)? Ĉu la zorgantoj pri tiuj ĉi laboroj ne estas liberaj agadi Esperante, kunlaborante kun ĉiuj aliaj E-istoj? Necesas havi tute alian skrukturon, kiu, krome (aŭ anstataŭ) AO, zorgu pri afrikaj laboroj, kiujn Hans Bakker konfidis al togolandanoj, ĉar pri tiuj ĉi laboroj scias neniu alia homo en UEA.

Tiaj aferoj kirliĝis en kapoj de TIETo-stabanoj ĝis fine de oktobro, kiam Renato Corsetti informis IZon 31 oktobro 05: *Sekve de la lastatempaj diskutoj, kiuj koncernas la funkciadon de la Afrika Oficejo de UEA, ĝian laboradon laŭ la ĝenerala spirito de UEA kaj la atingitajn rezultojn, ni informas vin ke la estraro de UEA laŭ la kontrakto deklaras, ke ĝi ne volas daŭrigi por la jaro 2006a la kontrakton en la nuna formo kun la Instituto Zamenhof. Ĝi volas ŝanĝi la tekston de la nuna kontrakto, kiu estos renovigita, se ni trovos interkonsenton, kun proponotaj modifoj kiel eble plej baldaŭ, ĉiukaze antaŭ la 15ª de decembro.*

Tiuj vortoj de Renato Corsetti pravigas la zorgojn de TIETo. *Vere ekzistu strukturo, ankaŭ kiu zorgu pri afrikaj E-laboroj.* La ideoj maturiĝis dum pli ol unu monato. Fine de novembro, jam estis klara la funkciado de tiu ĉi strukturo kun provizora nomo ACEH, kiu finfine en decembro 2005 fariĝis ACE (Afrika Centro Esperantista).

gk



***Civitano Gbeglo Koffi, esperantologo, disĉiplo de Hans Bakker kaj Giorgio Silfer, fondinto de Institut Zamenhof kaj ACE, unusola afrikano en la Akademio.***

## Verda afero en studenta medio togolanda



*Mi ne povis kredi ke ekzistas antaŭ pli ol cent jaroj la lingvo Esperanto, kaj ke ĝi estas mondskale parolata. La amaskomunikiloj ne donas sufiĉe da informoj pri ĝi. Unuafoje mi aŭdas pri tia artefarita lingvo, kaj agado de ties parolantoj en Togolando*, malkaŝis partopreninto de la inform-tago de loka Eo klubo UVA kaj la Junulara Organizo de Togolandaj E-istoj (JOTE) ĉe la marbordo de Avepozo, 11 mar 06.

La aranĝo povas esti konsiderata kiel sukceso. En ĝi partoprenis entute 34 gestudentoj de *Avenida*, privata kuirarta lernejo en Lomeo. Ili ĉiuj estas junaj, malfermitaj al interhomaj rilatoj kaj al fremdaj lingvoj. Tiel estis facile prezenti Eon kiel internacian lingvon de amikeco kaj kiel neŭtralan komunikilon.

La vicprezidanto de JOTE, s-ro Tété-Badu Nyinévi, prezentis Eon, de ĝia kreo ĝis ĝia enveno al Togolando kaj agadon de la junulara organizo tra la lando.

Kiel reprezentanto de la klubo UVA, mi klarigis al la partoprenantaro la manifeston de la movado por la internacia lingvo Esperanto, dokumento kiun mi zorge antaŭe distribuis franclingve al ĉiu partoprenanto.

La scivolemaj gejunuloj publike kaj private faris demandojn pri la lingvo, kaj ni respondis trafe al ili.

Estis varma tago, post kelkminuta naĝado en la akvoj de la maro, sub kokospalmoj okazis lud-konkursoj pri E-temoj, pri malsanoj sekse transmisieblaj kaj aidoso. Dum ĉi tiu programero, iuj gajnis E-aĵojn kaj materialojn disponigitajn al ni de asocio togolanda por la familia bonstato ATBEF kaj de la nacia programo de lukto kontraŭ aidoso PNLS.

Ĉiuj partoprenintoj, senescepte, estis kontentaj pri la aranĝo kaj proponis ties ripetadon.

Tiel simila programo, ne longe, estos organizata kun eventuala plilarĝiĝo al liceoj kaj kolegioj de Lomeo, kun invito de amaskomunikiloj por kreskigi la amikecon inter la partoprenintoj. Tiujn ĉi nun nutras E-kurseto sine de la lernejo post oficialaj kurshoroj.

**Adjévi Adjé**

# Afrikaj kontribuoj al nia literaturo

**Michel Nkwirikiye: *Gasuku la Aventurulo.* Lomé: ACE, 2006. 34p. 21 cm.** [CHF 10,- ĉe KCE]

Iam en Afriko, eĉ nun en iuj lokoj afrikaj, vespere, la infanoj sidis ĉirkaŭ fajro por aŭdi rakontojn de la maljunuloj. Estas fabeloj kaj fabloj. Michel, burundiano, aŭdis tiajn rakontojn, kaj ŝatus aŭdigi ilin al la E-komunumo.

Papago Gasuku kaj hundo estas la ĉefaj personoj en la rakonto. Ambaŭ estas tiom plenaj je afrikaj saĝaĵoj, ke multajn proverbojn ili uzas por komprenigi sian mesaĝon. Vivinte en arbaro, ili partoprenas kunvenojn de ĉiuj bestoj, kiuj volas elekti al si reĝon. Tiam, kiel la aliaj bestoj, ankaŭ Gasuku kaj la hundo laŭdas sin, emfazante sian kapablon kunesti kun homoj. Jen ili devas poste forlasi la arbaron por iri al loĝejo de homoj. Ambaŭ vere spertas multon, kiun Michel rakontas en sia verko. Certe Burundio estas lando kie abundas papagoj. Dum Gasuku vizitas aliajn papagojn, nur unusolan hundon renkontas ĝia kompano. Gasuku pasigas tagojn en ventro de krokodilo, antaŭ ol esti reĝo kaj havi belan edzinon. Ankaŭ la hundo povas vivi en domo ĉe homoj. Sed decide la sorto de ambaŭ bestoj ne estas brila kaj ironie, post momenta feliĉo, ili perdas ĉion kaj devas reiri al la antaŭa vivo…

Vere en la libro enestas suko de la fabeloj kaj diversaj proverboj afrikaj. La legantoj spertos kiel afrikanoj uzas vortfigurojn por esprimi multon. Tion ĉi vi komprenos el simpla lingvouzo, kiun la aŭtoro elektis por ĝuigi progresantojn kaj komencantojn.

**GBEGLO Koffi**

**Princo Henriko: *Festo de Beno.* Lomé: ACE, 2006. 28 paĝoj, 21cm.** [CHF 10,- ĉe KCE]

La aŭtoro de *Festo de Beno,* s-ro Prince Henry Ozoemena Chikoadi Oguinyé, naskiĝis 1 nov 1972. Helplekciisto en universitato, li estas niĝeriano, jurnalisto kaj estro de politika organizo. Li faris prelegvojaĝojn tra kelkaj landoj afrikaj kaj eŭropaj. Fondinto de E-kluboj en Niĝerio. *Festo de Beno* estas lia dua libro originale verkita en Eo.

Tra la libro, la verkinto prezentas proze la kutimojn de la etnio Igbo de sia patrolando. Li montras kiom ofte, ricevante eŭropan edukiĝon, junuloj afrikaj emas forgesi la kredojn de siaj prapratroj kaj eĉ foje profanas ilin, provokante tiel koleron de dioj. Musa, el la rakonto, estas unu el tiuj junuloj kiuj, konfuzitaj de okcidenta kulturo, fariĝis skeptika kaj finfine devojiĝas pri la moroj de sia medio. Dum festo en vilaĝo Umudioka, li estas invitita same kiel aliaj urbanoj. Dum la festoperiodo li ricevis instrukciojn ne profani la feston. Sed Musa havis alian ideon: defii la legendon. Kaj tion farante, li perdis sian vivon, kaj la tuta tribuo eltenis koleron de dio-patro. Rezultis malbonaj rikoltoj, katastrofoj, militoj kaj morto jarojn poste.

La libro estas verkita en bona stilo kaj facila lingvaĵo. En ĝi aperas glosaro kiu ebligas la legantojn kompreni la sencon de multaj arkaikaj vortoj uzitaj de la aŭtoro en la teksto. Se vi interesiĝas pri tradicioj en la nigra kontinento, legu nepre la libron de Princo, ĝi helpos al vi ĝui aspekton de moroj el Niĝerio.

**Adjévi Adjé**

***Chamberline Nguefack estas la unua afrika aŭtorino en nia literaturo. Herman Nyeck Liport kun ŝi adaptis fablojn, en ĵus eldonita novelareto. Nigra Ezopo ŝajnas do enkonduki afrikan Muzon al la verda Parnaso...***




# Togolanda Esperantologia Grupo

Togolanda Esperantologia Grupo naskiĝis en Lomeo 19 apr 06. La fondkunvenon partoprenis Abatévi Aba-Eklu (prezidanto), Adjévi Adjé, Kouessanvi Agbassou (kasisto), Kokou Atisso (sekretario), Kokou E. Attaglo, Koffi Doumegnon kaj Gbeglo Koffi. Ĉiuj formiĝis en la unua AfrES, kun Giorgio Silfer.

La kunveno aprobis kelkajn prioritatojn, kiuj ebligas altigi la prestiĝon de la grupo. Interalie TEG celas: a) apliki esperantologiajn sciojn en diversaj agadplanoj, b) enprofundiĝi en esperantologiajn konojn, c) disponigi esperantologiajn kursojn al la aliaj afrikanoj.



**C-ano Abatévi Aba-Eklu, 32-jara, fitoterapiisto, eksestrarano de JOTE, responsas pri projekto kadre de la Internacia Civil-Servo. Eseo en *Femina.***

De post la fonda kunveno, regule renkontiĝas TEG-anoj dufoje monate. En la dua kunveno (3 maj 06), ĉe *Institut Zamenhof* de TIETo, la membroj kunlernis pri tropa parolo kaj interlingvistiko, prezentitaj de Gbeglo Koffi respektive Kokou E. Attaglo. La tria, dum kiu estas programitaj historio kaj sociologio de Esperantio, fare de Adjé kaj Aba-Eklu, 17 maj 06, prokrastiĝis pro la pluva sezono.

TEG pli kaj pli akceptas la defion sur la nigra kontinento dank' al la motivoj de siaj membroj plu studi kaj instrui.

Ne eblas rimarkiĝi mondskale sen kunlaboro kun aliaj E-organizoj tra la tuta vasta Esperantio. Tial ni malfermas brakojn al ĉiuj, kiuj volas investi por la verda afero sur la nigra kontinento.

**(Kokou Atisso)**

# Niĝerio alvokas al la unua kongreso

*Mi informas, ke la antaŭaj miskomprenoj kun la Afrika Oficejo rilate al la Niĝeria unua kongreso nun estis solvitaj kaj ne plu estas miskomprenoj aŭ malkunlaboroj,* skribis Prince Henry Oguinye, prezidanto de Niĝeria E-movado (EFEN), kadre de la preparadoj de Niĝeria E-Kongreso en Badagry, 15-17 dec 06.

Laŭ Renato Corsetti, prezidanto de UEA: *Se anstataŭ vojaĝi al Burundio vi volus vojaĝi al Niĝerio, ankaŭ tio estus tre bona. Per via nura ĉeesto vi povas multe helpi la disvolviĝon de Eo en Niĝerio. Simple partoprenu kaj parolu en Eo.*

Pri la kongresaj programo, loko, aliĝilo… bonvolu kontakti: *<efen_2002@yahoo.co.uk>* (el retlisto de AK)

***Dato kaj loko estas konfirmitaj, sed bedaŭrinde la cetero – ne.***

# Afrika Esperantologia Semajno 2007

Mi ĝojas anonci el Kamerunio, ke c-ano prof. Giorgio Silfer definitive konsentas gvidi la duan AfrES en Buĵumbura [Burundio] dum la lastaj tagoj de 2007 kaj unuaj de 2008. La surloka kunordiganto estos c-ano Mushosi Birindwa.

La iniciato estos financata rekte de la Esperanta Civito, kvankam mi ne ekskludas la eventualan starigon de partnereco inter KCE en Svislando kaj loka movado uzanta Eon, se ĉi tiu estos akceptita en la Pakton. La projekto estas ekde nun gvidata de c-ano Birindwa, kunlabore kun c-ano Silfer.

**Chamberline Nguefack Zedong,**
Vickonsulino pri la Tria Mondo

# Gbeglo Koffi: por evolui la afrika movado bezonas helpon de ĉiu

*Eksa estrarano de UEA, akademiano, kunordiginto de la Afrika Komisiono dum multaj jaroj, profesie instruisto pri matematiko en duagrada lernejo. Ĉu kontenta pri viaj spuroj?*

Tio tute ne estas spuroj. Kiam ni estas en la kvina klaso de elementa lernejo, oni instruis al ni poemon, kies titolo estas *Ajoutons à l'humanité* (Disponigu ni ion al la homaro). Versoj de tiuj poemoj estas: *Oni petas de vi, / ne ke vi faru miraklojn, / sed ke vi lasu ion post vi. / Kiu plantas unu arbon, antaŭ ol morti, / tiu ne senutile vivis. / La arbo donos frukton, / aŭ almenaŭ ombron al la posteuloj*... Zamenhof plantis arbegon, ĉu ne? Kion mi faris jam? Nenion. Mi eĉ ne jam plantis arbusteton, eĉ ne kaneton. Do la vojo estas longa antaŭ mi. Via supra listo mencias nenion, kiu donos frukton aŭ almenaŭ ombron al niaj posteuloj. Mi pluserĉu. Tial ĉi mi tute ne povas iri nur unu vojon, sed ĉiam provu ankaŭ aliajn ĝis mi ne plu havos forton por tiaj aferoj. Eble ĝis tiam mi plantos kaneton. Sed ĝis nun mi nenion faris, kiu lasu spurojn. Tiaj vojoj estas plenaj je baroj ĉiaspecaj, kiujn oni devas ĉiam atenti. Obstino ege gravas en tio ĉi, kaj la poemo *La Vojo* de Zamenhof estu nia irletero. Irante en tiu ĉi spirito, ni venkos ĉiujn stumbligojn kaj torpedadojn, kaj eble iam atingos ion, se la naturo volas.

*Kiel vi ricevis la novaĵon pri la ĉesigo de la kontrakto kun Instituto Zamenhof far UEA?*

Tion ni jam skribis en alia teksto pri la kontrakto valida ĝis fine de 2005. Kiam en decembro 2005 Renato sendis novan proponon al Instituto Zamenhof, kunvenis TIETo-stabo, kiu devis analizi la proponon, kaj poste sendis siajn du proponojn al Renato por la estraro de UEA. Devis poste veni mesaĝo de Renato. Lia letero esence diris, ke ni akceptu lian proponon, se ne, ne plu estos kontrakto inter UEA kaj IZo. Plia kunveno de TIETo-Stabo okazis. Ni respondis, ke ni tute ne povas akcepti la proponon, sed pretas fari la laborojn sen kontrakto. Tiam UEA tute ne bezonas disponigi monon al ni el siaj spezokontoj por la plenumado de la E-taskoj afrikaj, kiujn ni faradas dum pli ol kvin jaroj, eĉ kiam ne estis kontrakto. Ni atendis reagon de UEA al nia letero, sed vane. Nur tra la reta gazeto *Libera Folio* de eksestrarano de UEA Kalle Kniivilä kaj ties gazetaraj komunikoj ni informiĝis, ke la estraro kaj ĝenerala direktoro rompis la kontrakton kun IZo. Nur post tio la ĝenerala direktoro skribis al ni por anonci tion.

*Kiajn kontaktojn vi havis kun la Estraro de UEA, la ĝenerala direktoro kaj la komitato post kiam translokiĝo de Afrika Oficejo estis anoncita?*

Eble vi ŝatus demandi, ĉu la kontaktoj estas amikaj aŭ malamikaj, ĉu ne? Se oni ne atingas siajn celojn, oni estas ne kontenta. Nia ĉefa celo estas, ke ni havu strukturon tute sendependan, kiu zorgu pri la afrikaj laboroj, kiujn Hans Bakker transdonis al ni. Tion ni jam havas en ACE. Tio sufiĉas. Kiam per sia kontrakto la estraro kaj ĝenerala direktoro de UEA malpermesas al IZo rilati kun aliaj E-organizaĵoj sen sia permeso, ni trovis, ke tio atencas kontraŭ nia sendependeco. Ni klare esprimis al ili, ke ni kunlaboros kun ĉiuj. Ili rompis la kontrakton, sed ACE daŭrigas siajn laborojn tute sendependa. Iam ni skribis al la ĝenerala direktoro, kaj en la mesaĝo estas jena frazo *nun kiam ĉiu atingis sian celon*... Li reagis, ke ili ne atingis sian celon, kiu estas havi la kontrakton kun IZo. Do li tute ne estas kontenta kaj ankaŭ la estraro. Postaj agoj de la estraro kaj ĝenerala direktoro vere montras, ke ili tute ne estas kontentaj pri la rompado de la kontrakto kun IZo, kvankam ili mem faris tion. Certe ili pensis, ke altrudante kaj minacante, ili atingos kion ili volas. Ne, tute ne povis esti tiel. Ne ĉiuj afrikanoj estas manipuleblaj. Kiuj estas tiaj, tiujn ili povis kapti kaj kaŝe mokas. Nur en la kunlaboro



nia kun ĉiuj ni povas multon lerni. Tial ĉi ACE daŭre etendas manojn al UEA, kies gvidantoj ĉiam rifuzas. Ĝi plurilatas kun afrikaj E-istoj, direktigas iujn al AO en Benino. Nenie ACE metas bremsojn al agado de gvidantoj de UEA. Sed tiuj ĉi tion faras kontraŭ ACE: baro de vojo ke informoj de ACE aperu en afrikaj retlistoj, rifuzo meti en la jarlibron informojn pri ACE, rifuzo malfermi konton de ACE ĉe UEA, neakcepto de artikoloj de ACE en la revuo *Esperanto* ktp. Al tiuj provoj bar-baraj ni en ACE reagas per agadoj. Jam aperis dek tri numeroj de la periodaĵo *KomACE*, du libroj de afrikanoj estas ĉe finpretigado, kursoj perfektigaj estas perkoresponde disponigataj al afrikanoj, materialo kursa estas sendita al kluboj ktp. Ĉu ankaŭ la naskiĝo de la *Deklaracio pri la Esenco de la Afrika Esperantismo* ne estas bona agado de ACE?

*Ĉu la tuta Estraro de UEA aprobis tiun subitan moviĝon de Afrika Oficejo al la najbara Benino?*

Mi tute ne povas tion scii. Kion mi scias, tio estas, ke ĉiuj estraranoj tute ne povas havi la saman opinion pri la afero. Sed ĉiuj estu lojalaj al la prezidanto, kiu siavice estas lojala al sia ĉefo, la ĝenerala direktoro de UEA. Ne miru ke estas tiel. La ĝenerala direktoro teorie estas sub la estraro, sed en la praktiko, la estraro estas sub li. Necesas vivi inter ili por tion rimarki. Al la estraro la ĝenerala direktoro diktas ĉion, kaj kiam la estraro iomete kontraŭstaras, li minacas ĝin per demisio: *Se vi volas agi tiel, mi demisios*. Jen do la estraro cedas.

*La Estraro jen sin esprimis koncerne la translokiĝon: "ĉar Instituto Zamenhof ne konsentis pri precizigo en la kontrakto, kiuj celis pli bone konformigi ĝin al la statuto de UEA". Kion vi riproĉas al tiu kontrakto?*

Tio estas jam menciita supre. La estraro kaj ĝenerala direktoro de UEA ŝatus estri IZon. Ili tute ne ŝatas, ke IZo rilatu kun ĉiuj E-organizaĵoj, kvankam IZo estas propraĵo ne de UEA. Estu diferenco inter AO kaj IZo. La plenumantoj de AO sekvu iliajn postulojn sed ne IZo. Gvidanto de UEA skribis ie, ke mia organiza laboro ne sekvas regulojn validajn en UEA kaj tial ĉi la estraro kaj ĝenerala direktoro rompas kun mi. Tuj mi reagis al Renato, ke li klarigu kiujn regulojn validajn mia organiza laboro ne sekvas. Li respondis, ke ni nur rifuzis lian kontrakton. Pri kio precize temis en la kontrakto, tion Renato diru al la publiko. Mi demandis lin pri tio, kaj li tute ne respondis. La tuta kontrakto estas arbitra kaj ne kongruas kun la statuto kaj regularoj de UEA. Tiu ĉi estas ne de Renato kaj Osmo, kaj tial ĉi ili ne ludu per homoj nome de la asocio, kiuj iniciatis la fondon de UEA, tiuj estis kosmopolitoj: kial nunaj gvidantoj de UEA tendencas al la malo? Ili tiel agas, eble ĉar ili ne scias, ĉu afrikanoj scias, kial ili lernas Eon. Ĝis nun kiom da afrikanoj scias pri la Deklaracio pri Esperantismo de 1905? Necesas aŭdi kaj legi iujn por kompreni, ke nenion pri tio ili scias. Eĉ kiuj scias tion, kiel ili aplikas ĝin? Ĉu en tiu ĉi formo nur tiu Deklaracio priskribas kiel afrikanoj E-istoj vivu sian E-istecon? Necesas, ke afrikaj E-istoj klare montru al la tutmonda E-istaro, kiel ili konsideras Eon sur la nigra kontinento. Kiam ili estos farintaj tion, tiam oni pli bone komprenos ilin kaj scios kiel konduti al ili. Vere, sen tio, ili estos ĉiel manipulataj, surtretataj, dividataj, subaĉetataj de malbonintencaj homoj, kiel tio okazis fine de 2005 kaj plu daŭras. Feliĉe klopodoj de Afrika Centro Esperantista naskis dokumenton, kiu klare priskribis la esencon de la afrika esperantismo. Certe tio helpos al ĉiuj, kvankam jam timas afrikanoj, kiuj ŝatus profiti de la nuna situacio por atingi kion ili volas. Ili tute trankviliĝu, la *Deklaracio pri la Esenco de la Afrika Esperantismo* (DEAE) helpas ĉiujn, kaj afrikanojn kaj eksterafrikanojn. Kion afrikaj

# Interkonsento kun KCE: estas ĉe TIETo la lingvoekzamena centro por Afriko

Kultura Centro Esperantista (poste: KCE), reprezentata de sia prezidanto, c-ano Daniel Muhlemann,
kaj
Tietti-Instituto de Esperanto en Togolando (poste: TIETo), reprezentata de sia prezidanto, c-ano Mensah Attiogbe Agbemadon, kun la asisto de sen. M.-F. Conde Rey, Vickonsulino pri edukado, interkonsentis pri la sekva:

1) KCE delegas al TIETo siajn povojn konforme al la artikolo 2 de Direktivo Muhlemann, koncerne ĉiun afrikan teritorion, escepte de la ŝtatoj kiuj havas bordon ĉe la Mediteraneo (Maroko, Alĝerio, Tunizio, Libio, Egiptio).

2) La delego ne inkluzivas la rajton por TIETo mem delegi la samajn povojn al aliaj establoj aŭ individuoj pri unuopaj teritorioj en Afriko: tia(j) subdelego(j) devas esti ĉiufoje aparte interkonsentitaj inter KCE, TIETo kaj la subdelegota establo.

3) La delego inkluzivas la devon por TIETo organizi nur lingvoekzamenojn laŭ LTSEC (LingvoTesta Framo de la Esperanta Civito.

4) La delego daŭras unu jaron, kaj estas aŭtomate renovigita se, minimume naŭdek tagojn antaŭ la ĉeso de la valideco, nek KCE nek TIETo skribe komunikas al la alia la intencon modifi ĉi tiun interkonsenton aŭ retiriĝi de ĝi.

5) TIETo aŭtonome enkasigas la kotizojn por la ekzamenoj sur la afrikaj teritorioj kaj por la ekvivalentigo de diplomoj, atentante pri la dismoj, laŭ direktivo Hiltbrand, pagendaj al la Esperanta Civito (tra Fonduso Pro Esperanto).

6) Pri ĉiuj detaloj por la apliko de ĉi tiu interkonsento akordiĝos inter si c-anoj GBEGLO Koffi kaj Giorgio Silfer.

*La unua periodo kovrita de ĉi tiu interkonsento estas 1an de septembro 2006 – 31an de aŭgusto 2007 (lasta tago por anonci rezignon: 2an de junio 2007).*

**Societo Internacia por Paco Universala (SIPU) havas E-sekcion kaj utiligas Eon kiel laborlingvon. Tial SIPU estis akceptita en la Pakton por la Esperanta Civito.**

**SIPU situas en Buĵumburo sed ne posedas propran lernejon, male al TIETo, kiu proprietas Instituton Zamenhof. Tial ne estas probable, ke KCE interkonsentos pri partnereca rilato. Sed certe okazos kunlaboro, perspektive al la dua AfrES.**

---

E-istoj atendas de Eo, tion klare montras DEAE, kaj tion eksterafrikanoj helpu afrikanojn realigi.

*En la nuna cirkonstanco kelkaj viaj longjaraj amikoj kaj kolegoj akuzas vin hipoteki la movadon en Togolando. Kiel vi reagas al iliaj asertoj?*

Vere mi tute ne komprenas la demandon, ĉar la vorto *hipoteki* iomete ĝenas min. Mi devis konsulti vortaron, PIV. Ĝi diras pri Hipoteko*: rajto, laŭ kiu nemoveblaĵo aŭ ŝipo servas kiel garantiaĵo por monŝuldo.* Ĉar vi uzas la vorton *akuzi*, mi komprenu, ke iu kritikas mian laboron en la Togolanda movado. Se estas io tia, do la personoj estas ne miaj amikoj, ĉar miaj amikoj estas vere sinceraj, kaj kiam estas io malbona inter ni, ni lavas la malpuran tolaĵon en domo. Estas tempo, ke afrikaj E-istoj konsciiĝu pri sia E-isteco kaj sekve difinu gvidliniojn por sia konduko por ne ridindiĝi ekstere. Certe vi scias en kiu senco vi uzas la vorton *hipoteki*, kaj sendube temas pri misdiroj direkte al mi. Mi ĝojas, ke estas tiel, ĉar la persono povis esprimi sin, do tiel uzas sian lingvoscion. Gratulon al li! Nun la demando estas: *ĉu tiel ni kondutu ankaŭ en la E-medio, kie ni luktas por interfratigo ?* Kiu scias pri la Deklaracio de Bulonjo, tiu senhezite respondus JES. La punktoj 1 kaj 5 de tiu ĉi deklaracio ĉion montras. La kvina estas pli klara. Laŭ ĝi, kiu uzas Eon por ŝteli, kalumni, subfosi, ktp, ankaŭ tiu estas Esperantisto. La interfratiĝo tute ne aperas en tiu ĉi deklaracio. Ĝi estas *afero pure privata, por kiu Esperantismo ne respondas*. Se nun ni, afrikaj E-istoj, ŝatus doni alian signifon al nia agado, kaj laŭ tiu ĉi signifo juĝu pri niaj kondutoj, tio estas nia afero pure privata, pri kiu ni respondecas mem. Ion tian iniciatis DEAE. Ĉiuj afrikaj E-istoj estas petataj enprofundiĝi en tion ĉi, ke ni ĉiuj vere unuiĝu por zorgi pri nia afero. Nur tiel ni povas harmonie progresigi nian movadon. *Ŝafaro harmonia lupon ne timas*. Por atingi tiun ĉi harmonion ni estu senlime pardonemaj kaj samtempe singardaj precipe al niaj ŝajnaj amikoj, kiujn ni pli atentu ol tiujn, kiuj malkaŝe malamas nin. Ni tamen kunlaboru kun ĉiuj tute malferme, kaj certe iam ni atingos veran harmonion.

*Post kiam Roterdamo turnis dorson al Lomeo, vi sufiĉe kritikis la sintenon de UEA (Renato kaj Osmo) forigi viajn adresojn el siaj retlistoj. Nun ke vi estas komitato A por Togolando, ĉu vi havas la impreson, ke tiu sinteno nun ŝanĝiĝas?*

Nun mi trovas tiun sintenon de Renato ege helpa, ĉar tio ebligis al mi lerni multon kaj nun mi kapablas ĉiel ajn starigi retlistojn kaj dissendi tute libere miajn informojn. Ankaŭ eksterafrikanoj kunsentemaj ege helpas. Kaj gravege: mi pli kaj pli enprofundiĝis en Eon. *Mi dankas la venton, ĉar, repurigite, mi forton pli freŝan akiras...*

*Multaj afrikanoj petas la Esperantan civitanecon. Ĉu vi vidas tion kiel problemon, aŭ ĉu nova etapo en Afriko? Ĉu vi supozas, ke la situacio povos ŝanĝiĝi en la proksima estonteco?*

La afrika movado bezonas helpon de ĉiu por evolui. La rilato de afrikanoj kun la Civito estas okazeblaj. Tamen ĉiu sciu kion li volas. Kion afrikanoj povos atingi per la Civito? Kion la Civito povas fari en la evoluigo de la movado en Afriko? Necesas, ke ĉiu pripensu tiun ĉi flankon de la afero. Kio gravas, tio estas la progresigo de la afrika movado, kaj en tio ĉiu rajtas semi, kaj por tio ĉiuj rajtas kunlabori kun ĉiuj. Nun DEAE estas kun ni, kaj ĝin ni ĉiam konsultu en nia agado.

*Kiuj financas la laboron de ACE ? Ĉu ties prizorgantoj ricevas ian pagon aŭ ĉu ili estas plene volontulaj?*

Kion vi rimarkas pri la laboroj faritaj ? Ni nenion bedaŭras. Ni jam proponis al la gvidantoj de UEA, ke ili ebligu al ACE fari la afrikajn E-laborojn sen ricevi la monon 5.000 eŭroj. Ili rifuzis. Certe ili scias kion ili celas. Se la laboroj jam okazis antaŭe, sen subvencio de UEA-spezokonto, kaj poste kun tiu ĉi subvencio. Se nun ACE ŝatus daŭrigi la laborojn sen la subvencio, la estraro kaj ĝenerala direktoro de UEA devus akcepti. Kial ili rifuzas? Tio klare montras, ke ili havas tute alian celon kaŝitan, kaj por tio ili rompis la kontrakton, translokis la literojn A kaj O al Benino kun bagatelecaj tasketoj, lasante la esencajn laborojn en Togolando plenumatajn de ACE. Laborojn faras ne mono, sed homoj. Tiaj ĉi abundas nun en Togolando.

*Ĉu vi taksas bone la kvaliton de la komunikadon inter vi (ACE) kaj UEA ? En kio ĝi estus pliboniginda aŭ eĉ plibonigenda?*

Temas tute ne pri UEA sed pri la ĝenerala direktoro kaj estraro de UEA. Ili tute ne rilatas kun ACE kaj neniam parolas pri ĝi. Kiel mi diris supre, ili, male, metas ĉiajn barojn al ĝia agado, insidante kiel serpento. Kiuj kulpas en tio ĉi? La respondo estas simpla: temas pri la nebulo ĉirkaŭanta la uzadon de Eo fare de afrikaj E-istoj. E-istoj-laboristoj klare montris sian irleteron, kaj nun ĉiuj komprenas ilin. Se ankaŭ afrikanoj havus tion, la estraro kaj ĝenerala direktoro komprenus ilin, kaj scius kiel rilati kun ili. Tiuj ĉi gvidantoj de UEA ĉiel ajn agadis al Afriko, kiam ne estis DEAE. Nun certe estos granda ŝanĝo, ĉar ili scias klare, ke afrikaj E-istoj ne ĉion ajn de ili akceptos. Kun la espero, ke tiuj ĉi vortoj kontentigos vian scivolemon, mi deziras sukceson en via E-agado. Por sukcesi en tiu ĉi vojo, necesas la sinkono. Kion vi celas? Se monon, vere vi vagados sencele kaj vane, sed se konojn, vi iros de sukcesoj al sukcesoj, ĉar, kiu havas la konon, tiu havas la povon, kaj per tiu ĉi povo oni sukcesas multon. Ĉion bonan!

**intervjuis Adjévi Adjé**